

esperanto USA

1992(6)

The ELNA Newsletter: News of the Language Problem and Esperanto as the solution

ĈU VI JAM PAGIS VIAN KOTIZON?


Our goal for 1993

1200

ELNA membership 1990

1031

Membership 362
on Dec. 14



New Members



Renewals to date



Life and Honorary members

Hot off the Press (again)

Two new American books

La Salmisto de Hamelin. Adapted by Hanna Hutchinson, translated by David Crowell, illustrated by Edward Nofziger. Cincinnati: AIMS International Books, Inc., 1992. ISBN 0-922852-17-0. 20+2 p. At ELNA: Code SAL003, Price \$3.00 (non-members) / \$2.85 (members).

AIMS International Books apparently publishes books for children in various languages. This time they've actually added an Esperanto book to their list—the ninth incarnation, under their imprint, of the old legend of the Pied Piper.

We all know the story, of course—the piper comes to town, drives out the rats, is refused his pay by the mayor when it comes time to pay the piper, and leads the town's children away into oblivion. Here, of course, the townspeople are in general more honest than their elected politicians, and take up a collection to pay the piper and get the children back—and impose an immediate term limitation on their crooked mayor, who ends up out in the woods with the rats (who, in the final illustration, look considerably happier than he does).

The language of the translation (who is David Crowell, by the way?) is simple and irreproachable; the illustrations, in four colors (white, black, dark green and light green), are a lot of fun. And the town even pays up in old-time Esperanto currency (the *speso*). Let us hope that AIMS will sell enough of these to convince them to add other Esperanto translations to their list—the Three Bears and Red Riding Hood are also available, but not yet in Esperanto.

If you have a child learning Esperanto, get it for him/her. But you'll probably read it first.

Don Harlow

Wagner, George E.: *La seĝo dektria* (2a eld., korektita). Berkeley: Eldonejo Bero, 1992. ISBN 1-882251-02-4. 22 p. Ĉe ELNA: Kodo SEG001, prezo \$3.00 (nemembroj) / \$2.85 (membroj).

El la jaro 1957 venas ĉi tiu en Usono verkita originala Esperanto novelo. Fraŭlino Korine Hebbler ricevis leteron pri eventuala heredaĵo. Ŝi devas reiri al la urbo Charleston por pravi sian devenon kaj tial la rajton. Sur la buso la sola libera seĝo estas la dektria. Korine, ne superstiĉa, ĝin akceptas. En la apuda sidloko troviĝas juna viro el eksterlando. Iliaj konversacioj kondukas ŝin al surprizaj riveloj, koincidaj kaj eble suspektindaj. Necesas al ŝi decidi pri la propra malkaŝemo en la interparolado kaj poste pri aferoj eventuale ŝanĝontaj ŝian vivon.

Pliajn detalojn kaj la finan rezulton vi trovu en la libreto mem. Rapide fluas la intereskapta rakonto. Ĝian mesaĝon al ni trafe proponas prof. James F. Cool en mallonga citaĵo dorskovrile.

La verkinto evidente venas (plenvole aŭ senintence) el la skolo nuntempe nomata "skemisma" aŭ "deinternisma." Troviĝas kombinoj kiaj: *elbusiĝi / enbusiĝi; la vidaĵaron ĉe ambaŭ flankoj de la ŝoseo; necentra hotelo; novtempe mi renkontis belegan fraŭlinon.*

Ekzistas iu stilaĵo, kiu nuntempe aperas arĥaisma: *estis leginta* kaj similaj verbformoj, kiujn hodiaŭ oni ordinare esprimus alimaniere.

Foje oni trovas troan ripetadon de sama pronomo aŭ alia vorto: "Lia patro provis malkolerigi lin sed li turniĝis kontraŭ la propra patro." (p. 6) "Kontraŭ ne alta honorario, ili kaj iliaj posteuloj estas

Daŭrigota sur paĝo 15

EDITORIAL

BAGATELOJ?

Retiro kaj pardonpeto

Per ĉi tiu peco mi celas ĉefe niajn neanglalingvajn legantojn; sed mi esperas, ke el ĝi ankaŭ niaj anglalingvanoj povas lerni ion.

En la lasta numero (vi ja legis ĝin, ĉu ne?) mi reklamis aperontan Literaturan Suplementon. Tiuj, kiuj zorgis legis la regulojn, eble rimarkis n-ron (c): "Tradukita materialo venu el la anglalingva literaturo, preferinde tiu de Usono."

Nu, kiam mi tajpis tion, mi ĵus pasigis longan tagon ... estis malfrue en la nokto ... mi estis premata de diversaj aperigi novan numeron de eusa ... kaj mi tial fuŝis la aferon. Do, por tiuj, kiuj volas proponi materialon por la Literatura Suplemento, jen la vera regulo (c):

Tradukita materialo laŭeble venu el la literaturo de la tradukinto.

Mi ja favoros materialon, kiu venos de ELNA-anoj. Sed ne ĉiuj ELNA-anoj estas anglalingvanoj. Troviĝas anoj en diversaj landoj; kaj inter tiuj, kiuj loĝas en Usono, estas ja tiuj, kiuj denaske parolas la ĉinan, la vjetnaman, la korean, la hispanan (eĉ la prezidanto de ELNA!). Tial mi sentas la bezonon pardonpeti al tiuj niaj anoj, kiuj eble sentis sin diskriminitaj de tiu aĉa (kaj nepre forigenda) regulo, kiun mi senprirpense surpaperigis. Ankaŭ mi opinias, ke miaj samcivitanoj en Esperantio ne devas suferi interne de la bariloj, kiujn trudas al ili la diversaj nacilingvaj kulturoj.

A Little Truth

When it came to military matters, Adolf Hitler was not very bright, luckily for everyone concerned. When it came to social problems, he may have been certifiable. But when it came to recognizing a few simple human truths, some of them not very palatable, he occasionally had a knack for recognizing and verbalizing them (with much more relish, it should be pointed out, than the rest of us would feel). For instance, the following famous aphorism is credited to Hitler: "If you tell a big enough lie often enough, everyone will believe it."

This comes to mind because I recently rediscovered a variant: "If you tell the truth often enough, badly enough, and inconsistently enough, no one will believe it." This

because I have started doubting...

Rob Hardy recently sent me, for "Language in the News," an article from the Dayton, OH, *Daily News*, dated November 20. It's called "Ferretting out fractured phrases: English takes a drubbing at foreign hotels, businesses." The article begins:

BRUSSELS, Belgium (AP)—

It's enough to make a grammarian groan. The European Community has collected some of the worst abuses of the Queen's English from around the world.

After quoting three of these examples of fractured English, the article continues:

Most of the dozens of such doozies in the EC's collection were compiled by its traveling translators beginning in July, when they were asked to look out for examples of odd English. Others were taken from published collections.

This was followed by ten or eleven more phrases, solid new proof that them iggerant an' uneddicated furriners cain't larn English. Except: almost every single one of these antique chestnuts has appeared here in *The ELNA Newsletter / esperanto usa* over the years, in some cases more than once. The last time some of them were printed (by me, a year or so ago) they were attributed to Air France.

Problem: the tenth time someone sees that a Paris boutique advertises "dresses for street walking," presented as a completely new discovery, he is going to wonder: (a) doesn't anybody else fracture English other than these half dozen hotels in Tokyo, Zurich and Vienna; and (b) does, in fact, anybody really fracture English, or are all these apocryphal creations of someone's (some Esperantist's, perhaps) cunning little mind?

Answer to (a): Yes, and such examples are not hard to find. As an example, an acquaintance of mine, who served for a year as our company's Tokyo rep, collected *six pages* of one-line examples of fractured—no, not fractured, *shattered*—English from signs and storefronts. He was not, incidentally, an Esperantist or even a language buff; he just did it for fun, in his

few spare moments.

Answer to (b): To be perfectly honest, I'm beginning to doubt whether these particular examples are real. I've seen them in too many different places, attributed to too many different collectors. Maybe it's time to put them to rest—forever.

An Editor's Needs

The main purpose of a local group bulletin is to let the members know what's going to be happening at the next meeting. Let me point out, however, that as editor of *esperanto usa* I'm not terribly interested in what your group is going to be doing next month; I need information about what you did last month. And the local club bulletins are the way I usually get that information. Yes, I know you don't publish those things for my benefit; they're for your paying members. But you might remember that if I don't know what you're doing, I can't publish your group's name, address and phone number on the "Regional Reports" page.

Incidentally, if we were giving out prizes for the best and (from my point of view) most useful local bulletins, I'd mention New York's *Novjorka Prismo*, published by Jim and Nancee Medrano, Chicago's *Saluton* under the editorship of Doug Portmann and Bern Wheel, and Edwin Grobe's *Arizona Stelo*. I feel uncomfortable about mentioning California East Bay's *La Orient-Ekspreso*, because (a) I've just spent a stint editing it (over with now!), and (b) having said that, I also have to admit that I'd class it no better than fourth place.

We also need book reviewers. If you have a favorite, relatively recent, book that you want to review, please feel free to send us your review, in English or (preferably) Esperanto. Sooner or later, if I decide that I like your particular style of reviewing, and can count on getting material from you, I'll start sending you titles to read and review. You get to keep the books—free! (On today's list: Zamenhof's *Lingvaj respondoj*, Varankin's *Metropoliteno*, and Bulgakov's *La majstro kaj Margarita*, all from Sezonoj in Ekaterinburg. Too late for these—but who knows what we'll receive next week?)

Don Harlow

NEWSBRIEFS

Esperanto in the Media

David Hiple, in "Arrest in Bucharest" in *Exquisite Corpse* (#33, 1991), describing being stopped for DWI in Romania, tells how his friend Greg "pleaded innocence in an esperanto of English, French, and Serbian." Obviously, from the sequel, not the real thing... (provided by Ionel Onet)

During a Murphy Brown episode (July 20, 1992) Murphy's coworker Corky sputtered out some nonsense about personal relationships to her boyfriend. Murphy, who was close by, screamed, "What was that?!? Esperanto?" (reported by Jacob B. Schwartz)

En el periódico *Ocho Columnas* de México (el 18 de Agosto 1992) apareció un reportaje escrito por Donna Birch en el San Francisco, CA, *Examiner* y traducido al Español acerca de los cursos en Esperanto ofrecidos durante el verano en el Universidad Estatal de San Francisco. (mandado por un estudiante postal de Cathy Schulze)

Responding to the article about J. Tilman Williams (see last issue's "Newsbriefs"), Lou Garner, a reader of the Los Angeles, CA, *Times* (Aug. 23, 1992) replies that "Esperanto never caught on with even a significant minority because it makes no practical sense" and insists that English is used just about everywhere by just about everybody. (sent by Yvonne Mitchell)

Not WKRP in Cincinnati but WCBE in Columbus, OH (Aug. 24, 1992), a radio station financed by the Columbus Board of Education, took the liberty of having one of its commentators deride Esperanto, making the statement that "Esperanto just never caught on." (reported by John Massey)

Libertarian columnist Stephen Chapman, in a review of how "Political changes threaten E[uropean] C[ommunity]" in the Portland, OR, *Oregonian* (Sep. 4, 1992), writes that "nine months ago, the nations of Western Europe were ... abandoning obsolete nationalism for a border-free Esperanto world." (sent by Betty Walther)

En el *Diario Las Americas*, el 6 de septiembre de 1992, apareció el artículo "Esperanto, idioma universal", escrito del Sr. Casimiro Alvarez Román, miembro de ELNA. (de Casimiro Alvarez)

"Professor makes case for Esperanto" in the Collinsville, IL, *Herald-Journal* (Sep. 9, 1992) refers to Prof. Ron Glossop at Southern Illinois University at Edwardsville, and describes his participation the the 1992 World Esperanto Congress in Vienna and his presentation of a talk on "A New World Order: Two U.S. Viewpoints" at the International Congress University. (sent by Ron Glossop)

Samuel Francis, in "Nonmetrically Yours" in *The Wanderer* (Sept. 10, 1992), as part of a diatribe against the metric system, insists that "it belongs to the same school of thought as Esperanto..." (sent by James Davis)

Esperanto was mentioned again (as an aside) by Neil Conant on National Public Radio's "Weekend on Saturday" (Sep. 12, 1992), comparing the slowness of its progress with the speed of dissemination of the jargon used in the movie "Wayne's World" in Europe. (mentioned by, among others, Tom Eccardt, Jim Leiberman, and Jonathan Pool, all of whom wrote letters to NPR)

On the game show *Jeopardy* (Sep. 14, 1992), under the category "Languages": "In Esperanto, the verb *ami* means to do this." The answer, "What is to love?" was given correctly. (reported by Lee Venters)

"SIUE professor addresses Esperanto conference" in the Granite City, IL, *Journal* (Sep. 16, 1992) is also a report on Prof. Ron Glossop's participation in the Vienna World Esperanto Congress. (sent by Ron Glossop)

Compuserve Magazine (Sep. 1992), the monthly organ of the well-known computer information network, carries an article "A Global Tongue?" which praises Loglan while dismissing Esperanto as "problematic for modern telecommunications." Strange, considering that Esperanto is the only constructed language represented in Compuserve's Foreign Language Forum with its own bulletin board and library... (reported by Glenn Williams)

According to *This Week in Germany* (Oct. 9, 1992), the result of a contest to name the smallest coin, one one-hundredth of an Ecu, in a future United Europe is the word "cent,"

partly because this is the Esperanto term for "one hundred." (reported by Gerald J. Newall)

Spied in *The Mariner's Book of Days*, 1992 edition, by Peter H. Spectre, published by Woodenboat Books: entry for 30 October, 1992, notes that the first International Fishing Schooner Race series was won by the Gloucester schooner *Esperanto* on that date in 1920. (reported by Robin Henderson)

Scott S. Smith's "The Language Challenge" in *The American Funeral Director* (Oct. 1992) suggests that those with a learning block start with Esperanto, and gives ELNA's toll-free number. (from the ELNA C.O.)

In an article "Shadowfax at Gilly's" in the Dayton, OH, *Downtowner* (Nov. 4-10, 1992), editor Jim Nichols discusses the band's new album *Esperanto*, published on the EarthBeat label. "Esperanto was the language developed in the 19th century to break down boundaries and increase communication. Shadowfax plays to the same goal by transcending music boundaries and combing (*sic*) the rhythms and melodies of many musical cultures." It is not clear whether the album has anything in common with Esperanto besides the name. (sent by Rob Hardy)

In the insert accompanying the new Shadowfax CD *Esperanto* (see above), the user is informed that "Esperanto is the universal language developed to help break down cultural boundaries and to facilitate communication among the peoples of the world."

The Florissant, MO, *North County Journal* (undated) reported on the World Esperanto Congress participation of Prof. Ron Glossop and Mary and Jerry Johnson, all of the St. Louis area. (sent by Ron Glossop)

The coat of arms of The Institution of Analysts & Programmers (Charles House, 36 Culmington Road, London W13 9HN, Great Britain) bears the Esperanto motto *Logiko estas mia servisto*. (pointed out by Glenn Williams)

Heard while surreptitiously watching futuristic animated comedy, *The Jetsons*, one afternoon: the Jetsons' teenaged daughter Judy complaining about her homework load, which included such courses as quantum physics, galactic geography and ... Esperanto. (reported by Robin Henderson)



REGIONAJ KAJ FAKAJ RAPORTOJ

Esperanto-Agado en Usono

ARIZONA

Jam de pluraj semajnoj Nita Jones instruas Esperanton ĉe Patterson School en la urbo Gilbert. Ŝi antaŭesperas, pro la entuziasma subteno de la tiea direktoro s-ro Chomokos, povi daŭrigi la instruadon ĝis la fino de la lernejo. Patterson School havas kvin apartajn sesajarnivelajn klasojn kun tutklasara lernantaro atinganta sumon de 124 geknaboj. Ĉiutage s-anino Jones instruas Esperanton al unu el la kvin klasoj laŭ rotacisistemo ebliganta al ŝi viziti laŭvice ĉiujn klasojn en la daŭro de unu semajno antaŭ ol rekomenci la rotacion. (raportis *Arizona Stelo*, novembro 1992)

La 24an de oktobro kunvenis 13 arizonaj esperantistoj ĉe la Arizona-Centro en Phoenix. Inter aliaj temoj, oni diskutis la propregejan laboron kiun Rikardo kaj Nancy Culwell volontule faras ĉe meksikia orfejo sude de Nogales, la internacian perkomputilan esperantlingvan komunik-reton, kaj la aventurojn de Bonnie kaj Nikolas Greger-Fonseka ĉe la Kultura Centro Esperantista en Svislando. (raportis *Arizona Stelo*, novembro 1992) Esperanto-Societo de Arizona, 1620 North Sunset Drive, Tempe, AZ 85281

CALIFORNIA

Komencgradaj kursoj okazas du fojojn en la monato ĉe la River City Metropolitan Community Church en Sacramento. Instruanto estas Steve Schwichow. La kursoj daŭros ĝis Februaro, 1993. (raportis la bulteno de la Esperanto-Societo de Sacramento, oktobro-novembro 1992) Esperanto-Societo of Sacramento, P.O. Box 60860, Sacramento CA 95860

De la 6a ĝis la 8a de novembro, entute 11 esperantistoj kunsidis en Senkrokodiliga Semajnfino ĉe la YMCA Point Bonita norde de San Francisco por diskuti la eksteran informadon kaj estontaj Esperanto-agadoj en Norda Kalifornio. Ligo de Orient-Golfaj Esperantistoj, P.O. Box 324, Berkeley CA 94701-0324

ILLINOIS

La "Esperantistaj Ursidetoj" de Roxann Karpenski nun aperas en kabla televido. La unu ĵus aperis en Evanston dum intervjuo kun Tony Gravagno. Se vi volas adopti unu el tiuj belaspektaj amiketoj (kun blanka kamizolo kaj verda stelo), kontaktigu kun

Roxann ĉe (1 312) 282-3186—la kosto estas \$8.00 (profitoj iras al la Esperanto-Societo de Chicago). (raportis *Saluton*, oktobro 1992) Esperanto Society of Chicago, P.O. Box 64774, Chicago IL 60664-0774

MICHIGAN

En Detroit, anoj de loka klubo de "Star Trek" komencis studi en kurso kun Sheri Wells. Estas evidente, ke la ideo de Unu Lingvo, Unu Registaro kaj Unu Popolo kun komunaj celoj tre similas al la fundamenta premiso de la Unuiginta Federacio de Planedoj. Alemanŭ 22 trekantoj studas kun Sheri ĉiumonate po tri horojn. (raportis *Saluton*, oktobro 1992) E-o Soc. of Michigan, PO Box 3011, Southfield, MI 48037, (313) 646-2965

NEW YORK

La 28-an, la 29-an kaj la 30-an de oktobro 1992 okazis ĉe CUNY Graduate Center en Novjorko internacia konferenco pri Geolingvistiko en la Naŭdekaj Jaroj, patronita de American Society of Geolinguistics kaj la Academy for the Humanities and Sciences de City University of New York. Inter la prelegantoj estis kvar esperantistoj: d-ro Julius Balbin, Cécile Low, d-ro Julius Manson, kaj d-ro Frank Nuessel. (raportis *Novjorka Prismo*, novembro 1992)

Aŭtunaj klasoj komenciĝis ĉe Stuyvesant Adult Center en Novjorko, la 20an de oktobro, kun rekordaj nombroj de kaj studentoj kaj kursoj. 28 studentoj partoprenas en la komencgrada kurso de Julius Manson. 15 el la komencantoj restas post tiu klaso por la kurso de Jim Medrano, kie ili aŭdas kaj parolas nur Esperanton dum plia horo. 7 progresintaj studentoj partoprenas en la kurso de Tom Eccardt, por kiu li preparis specialajn frazlistojn. (raportis *Novjorka Prismo*, novembro 1992)

Inter lastatempaj alilandaj vizitantoj-esperantistoj ĉe la novjorkaj esperantistoj estis d-ro Zheng Bocheng, medicina esploristo el Ĉinio, kiu turismis en la urbo kun Enrique Ellemberg kaj Lydia Tabor; kaj Roberto Resende, brazila dentisto, kiu gastis en oktobro kaj novembro ĉe Tom Eccardt kaj Jim kaj Nancee Medrano. (raportis *Novjorka Prismo*, novembro 1992) Esperanto-Societo de Novjorko, c/o UEA, 777 UN Plaza, New York NY

10017, (212) 687-7041

WASHINGTON

La 25an ĝis la 27a de septembro okazis ĉe Fort Worden State Park, apud Port Townsend, la Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco (NOREK). Ĉeestis 43 personoj el diversaj partoj de la okcidento de Usono kaj Kanado. Dum dutaga plezura kunestado, oni prelegis kaj pritraktis plurajn interesajn aferojn; aparte interesa estis la parolado de Wally du Temple pri la okazonta referendumo en Kanado.

Kio okazas krom futbalo ĉe Vaŝingtonia Ŝtata Universitato? Esperanto! Nun ekzistas oficiala Esperanto-klubo en kadre de la VSU studento-societo, dank' al la strebo de Julie Kerr kaj Mary Greenblatt ("disĉiplino" de Julie). Ok membroj kunvenas ĉiusemajne por lerni, paroli, kaj amuziĝi. Dum la lasta kunveno, la grupo ĝuis traduki insultajn diraĵojn, ekz. "malmolaj fazeoloj" kaj "aĉulo"! (La sono de tiu lasta similas ternon.) (raportis *Ĉiam Verde*, bulteno de la Seatla Esperanto-Societo, novembro-decembro 1992) Seattle Esperanto Society, 14833 39th Ave. N.E., Seattle WA 98155, (206) 365-5509

UNUIGINTAJ NACIOJ

La 1an de oktobro Julius kaj Betty Manson ĉeestis akcepton ĉe B'nai Brith por ambasadoro Edward J. Perkins, la nova estro de la Usona Misio al la Unuigintaj Nacioj. En sia parolado li diris, ke UN estas necesa por la mondo nun kaj en la antaŭvidebla estonteco. Li ankaŭ diris, ke li subtenas "Agenda 21", la grandan planon pri agado aprobitan per aklamado ĉe la Ter-Supro en Rio-de-Janeiro dum la pasinta jaro. Post kiam ambasadoro Perkins paroladis, ges-roj Manson persone parolis kun li. Li scias pri Esperanto, sed liaj okuloj eklumiĝis kiam ili diris, ke informo povus esti sendata per Esperanto al almenaŭ 115 landoj, kie lokaj esperantistoj povus traduki la informojn en siajn proprajn lingvojn. Li diris, ke li ŝatus ricevi materialon pri Esperanto. Do ili senprokraste liveris al li leteron kun, inter aliaj dokumentoj pri Esperanto, kopion de la Rezolucio de UNESKO, kiu proponas, ke Esperanto estu enkondukata en la lernejojn de la mondo. (raportis *Novjorka Prismo*, oktobro 1992) Esperanto-Societo de Novjorko, c/o UEA, 777 UN Plaza, New York NY 10017, (1 212) 687 7041

EL LA CENTRA OFICEJO

INFORMADO PASINTJARA

La Informa Servo de ELNA ŝanĝiĝis en la pasintaj jaroj. Ĉiu informpetinto nun ricevas du faldfoliojn pri Esperanto kaj liston de lernolibroj. Ĉiuj informpetintoj ankaŭ ricevas *ELNA Update* dum unu jaro, kiu informas ilin pri la tutmonda lingva problemo kaj Esperanto kiel ebla solvo.

Sed verŝajne la plej grava ŝanĝo en la Informa Servo dum la pasintaj du jaroj estas la instalado de 800-telefonnumero. Kiam Angela Harlow proponis la ideon, mi tute ne atendis, ke ĝi estos tiel sukcesa. Sed mi konstatis ĝian efikecon nur kelkajn semajnojn post la instalado. Je tiu tempo ni jam informis ĉiujn membrojn kaj klubojn pri la ekzisto de la 800-numero, kaj sendis bufrostrion al ĉiuj membroj. Ĵurnalistino telefonis al mi, kaj diris, ke ŝi longe interparolis kun la membroj de la ĉikaga Esperanto-klubo kaj planas aperi artikolon pri Esperanto en la *Chicago Tribune*. Ĵurnalistoj jam telefonis al mi por ricevi informon por artikoloj, sed ĉiukaze ni ricevis nur kelkajn informpetojn kiam la artikolo aperis. Sed kiam la artikolo aperis en la *Chicago Tribune*, ni ricevis pli ol 75 telefonvokojn en du tagoj. Poste venis aliaj sukcesoj: Leah Goldberg aperigis leteron en *Mensa Bulletin* kiu rezultigis pli ol 200 informpetojn, el kiuj almenaŭ 70% venis al la Centra Oficejo kiel telefonvokoj al la 800-numero, la ceteraj kiel leteroj aŭ poŝtkartoj.

Poste venis anonco pri Esperanto en *Buzzworm*, tutlande vendata ekologia gazeto. Pro tiu artikolo ni ricevis eble 100 informpetojn. En junio iu ĵurnalistino de *Seventeen* telefonis, petante informon kaj dirante, ke anonco pri Esperanto aperos en venonta numero. Mi forgesis pri tio ĝis mi revenis de ferio en aŭgusto, kiam Ionel diris, ke informpetoj al la 800-numero inundis la oficejon. Fakte telefonvokoj venis tiel rapide kaj ofte, ke Ionel devis plurfoje ŝanĝi la kasedon en la maŝino, kaj iu devis veni al la oficejo vespere por ŝanĝi la kasedon denove.

Ni pasigis ne malmulte da tempo transskribante la nomojn de junulinoj kiuj foje donis sian stratadreson sed forgesis doni la urbon kaj ŝtaton, kaj ni provis kompreni la vortojn de junulinoj

de sudusonaj ŝtatoj kiuj parolis kun nedeĉifrebla akĉento. Mi scias, ke Ionel aparte ŝatis tion. Tamen la afero estis tre sukcesa, kaj ni ricevis pli ol 1500 telefonvokojn. Ankaŭ la kluboj estis feliĉaj pri tio, ĉar ĉiumonate la Centra Oficejo sendas nomojn kaj adresojn de informpetintoj en tiu regiono al la kluboj. Mi poste mencias kion ni konstatis pro la artikolo en *Seventeen*, sed unue mi deziras menciigi du aliajn artikolojn.

Nur du-tri semajnojn poste, artikolo pri Esperanto kaj la loka movado aperis en *San Jose Mercury-News* pro la instigo de Don Harlow kaj aliaj. La artikolo estis sufiĉe favora al Esperanto, kio ne oftas en la gazetaro. Preskaŭ samtempe aperis fuŝa artikolo en la *San Francisco Examiner*. Mi trovis almenaŭ sep erarojn en tiu lasta. Sed la artikolo en la *San Jose Mercury-News* menciis la 800-numeron; sekvis alia inundeto. Ni ricevis 200 telefonvokojn kaj eble 50 leterojn.

Post kelkaj semajnoj alia artikolo aperis en loka ĵurnalo, denove pro la instigo de lokaj Esperantistoj. La artikolo estis tre favora, eble la plej favora kiun mi legis dum miaj jaroj en la Centra Oficejo. Ĝi estis tutpaĝa kaj eĉ havis kolorajn fotojn. La 800-numero trafis aperis en skatolo meze de la artikolo. Kiam la artikolo aperis mi atendis alian inundon, sed ĝi neniam alvenis. Ni ne ricevis pli ol 10 telefonvokojn pro la artikolo. Kial? Kio okazis? Mi konstatis poste, ke tiu artikolo donis la 800-numeron sed ne eksplikis, kial oni devus telefoni. Kiam la artikolo aperis en *San Jose Mercury-News* (kaj estis same pri la anoncoj en *Mensa Bulletin*, *Seventeen* kaj *Buzzworm*) la ĵurnalistino skribis, ke ĉiu kiu telefonas al ELNA ricevos la unuan lecionon de senpaga Esperanto-kurso. Jen la solvo al la enigmo. Kiam oni informas pri Esperanto, oni devas menciigi, ke ĉiu kiu telefonas ricevos ion, kaj tio estas senpaga. Ĉiu ŝatas ricevi ion senpagan.

Jen miaj konstatoj pri la 800-numero:

1) Oni preferas telefoni senpage ol skribi leteron aŭ poŝtkarton. Do ĉiu estonta informo aŭ artikolo devus menciigi la 800-numeron. Se ne, la rikolto de informpetoj estos magra.


2) La artikolo aŭ anonco devus doni kialon por telefoni al ELNA, nome ricevi informon kaj senpagan lecionon.

3) Kvankam ELNA havas nur du plentempajn dungitojn, ĝi estas ĉe la centro de informa reto de kelkdeko da kluboj kaj mil membroj. Sen la helpo de ili, la 800-telefonnumero estus preskaŭ senutila. Lastatempe, ankaŭ ĵurnalistoj fariĝis veraj membroj de la informa reto ĉar, kvankam artikoloj ne ĉiam estas favoraj, la aperigo de la 800-telefonnumero en artikolo signifas, ke interesatoj povas facile peti informilojn kiuj povas iom rebati la ĉikanojn kaj erarojn de eĉ la plej kontraŭema ĵurnalistino.

4) Homoj, eĉ usonanoj, ja volas informiĝi pri Esperanto kaj lerni la lingvon. La daŭre kreskanta ondo de informpetoj estas vera rebato al lingvistoj kaj aliaj "spertuloj" kiuj neas la valoron kaj utilon de Esperanto.

5) Sed la sukceso de la anonco en *Seventeen* tamen montris, ke ELNA ankoraŭ ne estas preta ricevi kelkmilojn da informpetoj. Kiam ni ricevis 1500 informpetojn en nur du-tri semajnoj, mi pasigis tutan semajnon farante nenion krom trakti informpetojn, Ionel same kiam mi forestis. Kio okazus se, ni diru, Larry King menciis la 800-numeron de ELNA? Tio estus fiasko, ĉar ELNA havas nur unu telefon-linion por la 800-numero, kaj ELNA devus pagi milojn da dolaroj por presi flugfoliojn kaj pagi fakturojn por la telefona servo. Ni neniam povus eĉ trakti tiom da informpetoj sen dungi aliajn homojn. ELNA nun havas nek la laborfortojn nek la monon trakti pli ol eble 5 000-10 000 informpetojn jare. Pro tio sekvas, ke informateco en Usono pri Esperanto kreskos nur malrapide. Ĉu estas solvo? Laŭ mi estas nur du solvoj: ELNA devas esti kontenta kreski nur iom post iom, kaj esperi, ke ju pli informpetoj pri Esperanto kreskos, des pli ELNA estos preta trafte trakti ilin. La alia solvo estas, kreskigi ELNAn, petante grandajn donacojn de mecenatoj kaj korporacioj. Se ELNA havas multe pli da mono, ĝi povus dungi

Daŭrigo sur paĝo 10



ANONCOJ

[La rubriko Anoncojenhavas diversajn reklametojn, petojn, ktp., kiuj estas diskonigindaj sed ne povas trovi lokon en alia rubriko. Nek ELNA nek la redaktoro povas promesi aŭ prirespondeci definitivan plenumon de io ajn promesita en anonco.]

La 25an de februaro 1993 la **Murmanska Esperanto-Klubo en Murmansk, Rusio**, festos sian kvinjarigon, Viaj gratuloj okaze de tiu datreveno kuraĝigos la klubanojn kaj instigos la murmanskanojn pli diligente lerni la lingvon internacian. Oni reciprokos almenaŭ bildkarte ĉiun gratulan leteron aŭ poŝtkarton. Klubanoj ankaŭ pretas korespondi; laŭaĝe ili estas de 13 ĝis 30, 40 kaj eĉ 60jaraj. Skribu al: Aleksas Masiukas, Vicprezidanto de E-klubo, prosp. Lenina 101-26, 183012 MURMANSK, Rusio.

La plej prestiĝa konkurso de la Esperanto-movado, la **Belartaj Konkursoj de UEA**, en 1993 ree invitas al kreado de originalaj kontribuoj al la Esperanta kulturo. Pluraj diversaj branĉoj—poezio, prozo, teatro, eseoj, kantoj, fotografio, vidbendo kaj infanlibroj—atendas konkursaĵojn, kies kremon oni distingos per monpremioj pli altaj ol la pasintjaraj (en guldonoj—la dolaraj valoroj estos eĉ pli altaj!). Por detala regularo, sendu unu respondkuponon al: **Universala Esperanto-Asocio, Belartaj Konkursoj, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM, Nederlando, telefono (31 10) 436 1044 aŭ (31 10) 436 1539, telefakso (31 10) 436 1751, telekso 23721 uea nl.**

La **Tut-Kalifornia Esperanto-Konferenco (TKEK)** por 1993 okazos inter la 2a kaj la 4a de aprilo en la Ramada Inn de Anaheim, Kalifornio, ĝuste apud Disneylando. Pli kompletajn detalojn oni povas ricevi de: **Intertalk, 15555 Huntington Village Lane No. 240, HUNTINGTON BEACH CA 92647, tel. (1 714) 373-0432.**

Nova kolora turisma prospekto en Esperanto aperis ĉe la urbo Nancy en Francio. Ĝi estas kvarkolora, kaj ekde nun ĝi estas disponebla senpage por

interesatoj. Indikante, ke temas pri Esperantlingva broŝuro, skribu al: **Office de Tourism, 14 Place Stanislas, BP 810, F-54011 NANCY Cedex, Francio, telefakso (33 83) 37 63 07.**

Post dekjara paŭzo, nun reaperis **Matematiko Translimen**, neregula revuo (ISBN 2-904752-00-5) de la Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj, subredaktado de prof. Christer Kiselman. La ĵus aperinta numero estas havebla kontraŭ 30 francaj frankoj aŭ 10,20 nederlandaj guldenoj. Por informoj kaj/aŭ mendo: **Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj, ĉe Francois Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 PARIS, Francio, telefono (33 1) 42 45 00 97, telefakso (33 1) 42 41 29 94, UEA konto iaem-x.**

Edveno Grobe, redaktoro de *Arizona Stelo*, ĵus aperigis novan vortareton: *Eta Arizona Vortaro, Vol. 1*, kun 100 specialaj Arizona-tamaj vortoj kun difinoj kaj ekzemplaj frazoj. La vortareto estas dulingva (Esperanta-angla). Por ricevi, sendu tridolaran mondonacon, dek 29-cendajn usonajn poŝtmarkojn, aŭ ses internaciajn respondkuponojn al: **Arizona Stelo, 1620 North Sunset Drive, TEMPE AZ 85281, Usono.**

Se vi interesiĝas pri nova komputila reto "ESPNET", kiu kunligos esperantistojn tra la tuta mondo, sendu mesaĝon al: **Boris Herman, Kaminska Grava 11, SLO-62351 KAMNICA, Slovenio, Internet Bherman@UNI-MB.AC.MAIL.YU, aŭ al Krpan BBS, Razlagova 22, SLO=62000 MARI-BOR, Slovenio, FIDONET "2:380/104".**

Ĵus aperis la angla traduko de la konata verkajo de Pierre Janton: *Esperanto: Language, Literature, and Community*. La libro ampleksas 169 paĝojn kaj kostas \$14.95 (broŝurita) aŭ \$44.50 (bindita). Por mendinformado: **State University of New York Press, c/o CUP Services, P.O. Box 6525, Ithaca NY 14851, Usono, tel. (1 607) 277-2211.**

Haveblas nova 16-paĝa anglalingva informpamfleto *Esperanto: A universal*

auxiliary language for the Baha'i Faith celanta ĉefe sed ne sole Bahaanojn, verkita originale en la franca de Philippe Chavignon kaj tradukita de Sidney Culbert kaj Allan Simon. Kosto estas \$2, kaj la pamfleto estas havebla ankaŭ en la franca, germana, hispana kaj portugala lingvoj. Mendo ĉe: **Philippe Chavignon, 22 route de Blois, 41130 SELLES-SUR-CHER, Francio.**

La Fondaĵo Ivo Lapenne starigis **Stipendion Ivo Lapenna**, kiun ĝi aljuĝas ĉiujare al kiel eble plej multaj disertacioj je universitata nivelo, kiuj temas pri esperantologio aŭ / kaj pri Esperanto en rilato kun interlingvistiko kaj estas ellaboritaj en spirito de L. L. Zamenhof kaj Ivo Lapenna. La stipendio estos ajuĝita en 1993 por disertacioj oficiale akceptitaj de universitata instanco en la jaro 1992. Se vi volas kandidatiĝi, skribu antaŭ la fino de februaro 1993, kun internacia respondkuponon, al: **S-ro Torben Svendsen, Vanløse Allé 57, 1.tv., DK-2720 VANLØSE, Danio, sendante samtempe du ekzemplerojn de la koncerna disertacio al: D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 GRAZ, Aŭstrio.**

Laŭ instigo de la Trenta Esperanto-Grupo, la turisma instanco de la trenta regiono ĵus aperigis **du belajn priturismajn broŝurojn en Esperanto**. Por kuraĝigi ilin daŭre uzi Esperanton, bonvolu peti la broŝurojn de: **Azienda di Promozione Turistica del Trentino, Vika Sighele 3, I-38100 TRENTO, Italio.**

NOTE TO MEMBERS OF ELNA: ELNA's Constitution mandates that the League make an annual membership address list available to the members. This list is intended for purely personal use, and ELNA has not, does not, and will not make this list available to any other organization or commercial enterprise. It has happened on occasion that ELNA's membership list has been made available to such organizations and enterprises by some other party, and ELNA members have received unsolicited advertising ("junk mail") as a result. Short of litigation, there is no way that ELNA can prevent this from happening. When you receive such mail and can determine that the source was the ELNA *adresaro*, please remember that ELNA is not the responsible party.

INSTRUISTA TREJNADO NIA PRIORITATO

de Stefan MacGill

[Ĉi tiun artikolon sendis Stefan MacGill, prezidanto de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kun peto aperigi ĝin kiel novjaran saluton. La usona filio de ILEI estas la American Association of Teachers of Esperanto, kiu estas atingebla pere de la poŝta adreso de s-ino Dorothy Holland-Kaup, 5140 San Lorenzo Drive, Santa Barbara CA 93111-2521.]

En 1993 ILEI volas klare meti la emfazon sur instruista trejnado. Ni elkalkulis la proksimuman instruadan bezonon por pluvivigi parolkomunumon de miliono da homoj, praktike sen denaska fonto de novaj parolantoj. Ni taksis, ke necesus logi ĉ. 200,000 homojn al kursoj ĉiujare por rikolti 40,000 parolantojn kaj uzantojn. Tio postulas daŭran popolon da 10,000 instruistoj. Por teni tiun popolon stabila necesas trejni ĉ. 500 novajn ĉiujare, kio postulas krei kernon da instruisto-trejnistoj.

ILEI ne havas forton tuj atingi tiun nivelon, ĝi tamen starigis al si la defion proponi 50 lokojn en instruistaj kursoj en 1993 kaj 100 en 1994. Modestan ekpaŝon ni prenis per tri-taga intensa kurso pri komunika instruado en la Esperanto-Centro Poprad (Slovakio) frue en novembro. Ĝi logis nur ok partoprenantojn, tamen el kvar landoj kaj la plimulto praktikantaj instruistoj.

En 1993 ni proponos almenaŭ tri kursojn. D-ro Duncan Charters, brito vivanta en Usono, gvidos la plej ampleksan, antaŭvideble du-semajnan en Kultura Centro Esperantista (KCE) en Svislando komence de julio. Li profesie trejnas lingvo-instruistojn apud Ĉikago, cirkulas en

avangarda eduka medio kaj aplikas la plej modernajn konceptojn kaj alirojn. La poprada kurso bazita sur la lernolibro *Tendaraj tagoj* estos ripetita; gvidantoj por pliaj kursoj certe ne mankas (Barcsay, Dahlenburg, Koutny, Smidéliusz, Szanser k.m.a.)

En la nova jaro ni kompilos registron de tiuj gvidantoj de instruistaj kursoj. Ĉiu skizos la specojn de kursoj proponebaj, kun diversaj daŭroj, cel-grupoj kaj instru-metodoj kaj la kondiĉoj bezonataj. Tiun katalogon ni proponos al landaj asocioj kaj Esperanto-Centroj. La malmultaj aliĝintoj al Poprad bezonas analizon. Ŝajnas, ke ILEI sukcesos oferti 50 kurs-lokojn en 1993, sed pli debateblas la kapablo trovi 50 taŭgajn kursanojn en la nunaj ekonomiaj kondiĉoj. Konkurenco de aliaj renkontiĝoj en la feria sezono ankaŭ malhelpas. Necesas fari kursojn ne nur por niaj nunaj instruistoj, sed ankaŭ por novaj, ĉu de fremdaj lingvoj, ĉu de pacaj aŭ sociaj studoj, kiujn ni devos konvinki eklerni Esperanton.

Kelkaj bazaj paŝoj necesas:

- Havigi por niaj movade organizitaj kursoj minimuman agnoskon ĉe edukaj instancoj, tiel ke instruistoj estu liberigitaj kun salajro por partopreni.
- Disponigi lokojn en tiuj kursoj preskaŭ senpage por instruistoj kun nesufiĉaj propraj rimedoj. Tiom urĝe ni bezonas kvalifikitajn instruistojn, ke la movado devus preti subteni kurs-partoprenon ne nur al tiuj, sed al ĉiu ajn instruisto, kiu havos la kondiĉojn poste adekvate instrui la lingvon.
- Organizati kursojn ne nur en Esperanto-

Centroj, sed ankaŭ laŭ oficiala sankcio en centroj de naciaj aŭ aliaj edukaj instancoj, kadre de la normala programo de instruista trejnado aŭ plutrejnado.

- Sisteme starigi reton da homoj, kapablaj trejni la instruisto-trejnistojn. Tiun temon ni atakos kune kun d-ro Charters okaze de lia vizito al Eŭropo somere.

Tiuj argumentoj bezonas detaligon kaj transformon al kohera laborplano. Ili tion ricevos en n-ro 92/4 de *Internacia Pedagogia Revuo*, kie aperos la plena versio de ĉi tiu novjara saluto.

Ne eblus adiaŭi 1992 sen mencii la sukcesan lanĉon de la Gimnazio de ILEI dum nia Konferenco en Bratislavo. Ĝi celas kontraŭi la perdadon de lernejoj kursfine.

Okaze de la jarŝanĝo indas elstarigi la kreskon de *Juna Amiko*, kiun ILEI nun prizorgas. Por festi ĝian dudek-jariĝon, anstataŭ 24 paĝoj, ĉiu numero havos 32 kaj povos pli taŭge enteni ion allogan por ĉiu aĝ-grupo inter 5 kaj 15.

Ni rekomendas membrecon en ILEI al ĉiu, kiu instruas, okupiĝas pri edukado aŭ rekonas ĝian gravecon al nia movado kaj komunumo. Nia organo *Internacia Pedagogia Revuo* portas valorajn fakajn artikolojn, strategiajn debatojn, kaj praktikajn informojn.

Ni estas konvinkitaj, ke kohera programo de instruista trejnado estas ŝlosilo al kresko kaj progreso. Per membriĝo kaj kunlaboro en nia agado, vi povas esprimi konkrete vian konsenton pri tio.

Ni deziras al vi ĉion bonan por la nova jaro.

Internacia Pedagogia Revuo

Tio estas la oficiala organo de ILEI; sub la redakto de s-ino Kovács Márta ĝi aperas kvarfoje jare en amplekso de minimume 36 paĝoj—plejofte pli pro la abundo da agado kaj informoj. Ĝi prezentas elstarajn fakajn artikolojn. Ekzemploj el lastatempaj numeroj:

- Kiuj kaj kiom da lingvoj denaskaj? (Rátkai Árpád, Hungario)
- Lernplifaciligilo pro antaŭmetitaj kursoj (D-roj H. Frank kaj V. Barandovska, Germanio)
- Konstatoj pri la nuna Esperanto-instruado (Rezultoj el konferenco en Fortaleza, Brazilo)
- La lernejo laŭ Komenio (Molnár A. kaj L. Hungario)
- Lernejo kiel praktikadkampo de la social-pedagogio (D-ro N. Schier, Germanio)
- Ĉu 'epiteto' aŭ a-frazero? (Shao Rong, Ĉinio)
- Kiel trilingva infano lernas distingi inter lingvoj (Corsetti, Taeschner, Italio)
- Esperanto kiel la unua fremda lingvo (Prof. Ronald J. Glossop, Usono)

Membreco en la Ligo kostas nur 80 svedajn kronojn aŭ 27 ned. guldencojn jare (el kiu 30 SEK iras al nia sekcio en via lando). Sekcioj en 33 landoj proponos kotizon en via enlanda valuto. Interesatoj petu de nia kasisto Informilon/Aligilon kaj nian trijaran laborplanon por la periodo 1992-94: S-ro Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio.

Juna Amiko

La sola revuo pli aĝa ol sla legantaro!

Dum dudek jaroj ĝi servadas la lernejojn kaj instruistojn. Ekde la nova jaro, ĉiu numero havos 32 paĝojn. En ĉiu numero ni povos prezenti kvizon, krucenigmon, tabul-ludon, teatraĵeton, rakontojn, korespond-amikojn, kantojn, digesteblajn gramatikajn klarigojn, rol-ludojn ktp. ktp. Ĉio en simpla kaj taŭga lingvaĵo, alloge ilustrata de Pavel Rak kaj Esperantina Mirska. Ĝi aboneblas ĉe ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, kontraŭ \$9.

26a KONFERENCO DE ILEI:

Pli granda, internacia kaj aĝvaria

Kun 112 paroprenantoj el 23 landoj, la 26a ILEI-konferenco en Bratislavo (Slovakio) estis la plej grandakaj internacia de la lastaj jaroj. Dank' al la situo, kolegoj el Pollando, Rumanio, Hungario kaj Bulgario povis unufoje partopreni, dum instruistoj el Aŭstralio, Argentino, Islando, Israelo, Usono kaj Zairio kompletigis la internaciecon. La aĝvario estas dankebla al nova iniciato de ILEI, gimnazia semajno por 13-16-jaruloj paralele aranĝita.

Ĉeftemo de la konferenco estis la vivo kaj lingvo-instruaj teorioj de la pionira pedagogo Komenio, kies 400-jaran jubileon oni nun celebras. Temajn prelegojn prezentis d-rino Vera Barandovska-Frank kaj s-ro Miroslav Malovec. Gast-prelegis en la malfermo la vic-prezidanto de UEA, d-ro Ulrich Lins, laŭ la temo "Edukado kontraŭ naciismo"; tio spronis viglan kaj aktualan debaton pri ŝovinismo, naciismo, internaciismo kaj paco kaj ilia rilato al Esperanto-instruado. Deko da pliaj prelegoj okazis dum la semajno kaj ankaŭ Cseh-seminario organizita de ILEI.

Dunovaj sekcioj estis akceptitaj: Kroatio kaj Rumanio. Aliĝpeto de Kubo estos poŝte traktita; rilatoj kun instruistoj estis starigitaj en la lasta jaro en Albanio, Armenio, Aŭstralio, Islando, Togolando kaj Ukrainio. Sur la eldona kampo konkreta atingo estis la apero de la dua kajero de la porjunulara lernolibro *Tendaraj tagoj*. Okazis parta estrarelekto, per kiu reeniris la gvidan organon d-ro Till Dahlenburg el Germanio.

Dum la UK en Vieno la Komitato de UEA akceptis regularon por la supera nivelo de la ekzamenoj de UEA/ILEI, kaj sesio por la elementa ekzameno rezultis en naŭ sukcesintoj kaj por la meza dek du.

SUKCESA LANĈO DE NOVA PROJEKTO

de BARCSAY Zsuzsa

Esenca parto de la 26a ILEI-konferenco estis la Gimnazio, t.e. internacia semajno por 13-16-jaraĝaj geknaboj. Ili loĝis, manĝis, ekskursis kaj ĉiutage konversaciis kun la konferencanoj, tamen la 18 geknaboj (el 8 landoj!) havis apartan programon kun 30-minutaj lecionoj pri matematiko,

literaturo, muziko, geografio, pri Komenio kaj kalkulado per sorobano.

La geknaboj povis interkonatiĝi kaj amikiĝi, pasigi vere agrablan semajnon en internacia medio. Unuflanke plilarĝiĝis ilia horizonto: brito persone aŭdis pri larumana lerneja sistemo, kroatino pri la sveda, ĉeĥoj, poloj, hungaroj (el landoj, kie Komenio vivis kaj multe agadis) interamikiĝis kun germanoj, do en la spirito de la interna ideo vivis tie la geknaboj kaj espereble tio influos ilin ankaŭ estonte. Ili aplikis Esperanton, lernante per ĝi diversajn temojn, serioze tamen en amuza formo.

La konferencaj gekolegoj povis spekti kvar publikajn lecionojn: po unu pri matematiko (P. Arnaudov, BG), pri muziko (ges-roj R. kaj F.-G. Rössler, Germ.), pri geografio (S. MacGill, NZ/H) kaj pri E-literaturo (E. Tvarozek, CS), krome prezenton de kunagadaj ludoj (G. Tilleux, Belg.). Tiuj lecionoj stimulis pedagogian kaj metodikan diskuton, do ne nur teorie sed ankaŭ praktike estis demonstrate, kiujn trajtojn de la instruista personeco kaj kiunivelajn fakajn sciojn postulas instruado; krome kiel instigi la geknabojn dum kaj inter lecionoj je aktiva partopreno en la lernprocezo.

Laŭ la prijuĝo de la geknaboj mem la muzikaj kaj matematikaj instruhoroj plej popularis. Belajn muzikajn programojn—kun fokuso je ritmo—ili prezentis al la konferencanoj. Al la internacia vespero pluraj kontribuis per literaturaj kaj aliaj programeroj, anticipe preparitaj. Ĉiu el la geknaboj estis unuflanke talenta, kapabla, inteligenta, aliflanke afabla kaj amikiĝema persono, kompreneble ĉiu memstara, aparta individuo kaj personeco. Pluraj el ili parolas kelkajn lingvojn. Estas promesige, ke ni havas tian junularon, kian reprezentas tiuj 18 geknaboj. Ni esperas, ke al venontaj gimnaziaj semajnoj povos kaj emos reveni pluraj el ili, aldone al novaj geknaboj, kun aĝo inter la Infana Kongreseto kaj la diversaj junularaj aranĝoj (IJK, IJS, IJF, IS ktp.)

Kelkaj geknaboj esprimis la deziron okazigi du-semajnan gimnazion. Tio, bedaŭrinde, havas obstaklojn, sed kiel kritiko—estas tre favora. ILEI intencas eldoni la studmaterialon de la gimnazia semajno, por ke ĝi estu ne nur efemera travivaĵo por la partoprenintoj, sed ankaŭ komuna trezoro por apliki, aŭ analizi kaj plibonigi.

Ni esprimas koran dankon al la gekolegoj instruintaj en la Gimnazio kaj gratulas kaj salutas la partoprenintajn geknabojn, kiuj elstaris ankaŭ per konscia, memvola disciplino.

WARM CHRISTIAN FELLOWSHIP ACROSS NATIONAL AND DENOMINATIONAL LINES

by Armin Doneis

Such was the uplifting, enlivening experience of Mary and Armin Doneis of Texas, as they convened with some 260 Christians from 20 nations. During this Ecumenical Christian Esperanto Congress, attended by Roman Catholic, Greek Orthodox and Protestant evangelical Christians of many shades and branches of the faith, in Hungary near Budapest, a free and eloquent exchange and sharing of the faith took place in Esperanto. The free and easy use of the International Auxiliary Language Esperanto as the official language facilitated lively discussions, a rich offering of lectures, sermons, prayer meetings, and warm fellowship. All this was possible, free from linguistic embarrassment, stammering and stuttering. Each understood all! The official use of the easy, elegant International Language Esperanto made this free and easy exchange of thoughts, inspirational sharing of experiences and witnessing to the universal effectiveness and salvation of the gospel, easily and convincingly available to all!

Everybody present benefitted greatly from the warm sense of solidarity that pervaded those meetings. All participants sensed the uniting fellowship and warm mutual appreciation of the many branches of Christianity present. This year we also shared thoughts, inspiration and fellowship with several Christians who for the first time succeeded in crossing borders from USSR! At this ecumenical congress, as in previous ones, the participants were all impressed by the free and easy international expression and sharing in a neutral language! Where else can one meet folks from so many countries and ethnic backgrounds and religious faiths, and freely and eloquently intercommunicate with all, without language problems and embarrassment?

This Ecumenical Esperanto Christian Congress, like previous ones, was for the Esperanto speakers from Pharr, Texas, an outstanding occasion to find new foreign friends in the whole world, free from language barriers! Again, as on many previous occasions the tremendous promise of Esperanto to draw people from many nations in a rapidly shrinking world, into closer amicable fellowship was strikingly demonstrated at the Ecumenical Christian Congress near Budapest! Mary and Armin returned home refreshed, invigorated and inspired to spread the Good News of the gospel in their world-wide contacts by using Esperanto!

INFANOJ ĈIRKAŬ LA MONDO: Progresraporto

de Charlotte Kohrs

[The editor received the enclosed report as part of a private letter at the end of September. I am repackaging it slightly as a report on the progress of Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo during the past year. For those interested, the address of IĈLM is: Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo, 3876 Belmont Ave., San Diego CA 92116.]

I'm happily involved in adapting our latest "lernolibreto", *La Bela Planedo*, in order to make lesson plans and guide two teachers at Freese School [San Diego, CA] who plan to introduce Esperanto to their classes this fall. Both have worked closely with me and are very much involved in our goals. I myself will only teach classes occasionally. We plan to demonstrate that, using a very limited vocabulary based on world geography and maps, elementary teachers who know very little Esperanto will be able to help children ask and answer questions in Esperanto, and through our project *Mondo-Rondo* correspond as a group, "bildkarte" with children's groups elsewhere.

I'm also revising *La Bela Planedo* for others; creating a much more useful abridged "dua eldono" of 16 pages instead of 20. We'll send you copies if you want to help us with our project and use it to introduce Esperanto to either adults or children. Your goal will be to help beginners discover that they can *speak* Esperanto freely—using a very limited vocabulary—before they plunge into serious study of the language.

The abridged edition of *La Bela Planedo* will be much more satisfying for teachers to use in elementary schools because:

(a) it eliminates many words in the first edition that are not used in the core of the booklet—the *geography games*; and in the early lessons puts more emphasis on words and sentences used in the *geography games*;

(b) you get to the *geography games sooner*—at Leciono 10 instead of Leciono 16;

(c) I am reorganizing the *geography games*; and adding more questions using "Kiom da..." with answers that will include the child's using *numbers*.

I am doing revision in consultation "telephone" with Ron Glossop, who has

already begun teaching a gifted class in an elementary school. Ron alerted me to the importance of activities using numbers. One reason is that our students learn the numbers so *easily*, and adore showing off their skills. The two number songs on our cassette are universal favorites.

For the two classroom teachers at Freese school, I'll use the same methods we began in May and June. We'll photocopy each of the first seven lessons (of the revised edition) on 8 1/2 by 11 pages with space at the bottom for students to write and especially to *draw*—an essential learning activity. Some of our songs will be taught concurrently, another essential activity for young children. In June the children themselves added verses (about the sun and planets) to the first two songs, drew marvelous pictures, and proudly made and took home their own books of the first lessons and three songs.

Ron and I are *excited* about what we are doing. Helped to feel at ease *speaking* Esperanto, using fewer than 79 words (besides numbers and proper nouns) in the geography games, an *adult or child can learn to speak enough Esperanto so that he/she can attend Esperanto groups in large cities around the world, introduce himself, talk a little about his own country, and ask questions about others' countries*. A very *limited* skill for sure—but a first step!!!!

Probably just as important: through many Esperanto games *using maps*, and the satisfying skills of knowing where important cities and countries are located, children want to learn *more* about other peoples and places—and take a *giant* first step as world citizens.

In the second section of our 1991 video, four groups of fifth / sixth graders, in four short lessons, introduce Esperanto using some of the *geography games* in *La Bela Planedo*. If you can use that video, we'll gladly send it.

I'm embarrassed about my tendency to go on writing little booklets. Each time, I come closer to what I want to achieve—namely, encouraging Esperantists to introduce Esperanto in elementary schools (and offering them simple, almost fool-proof lesson plans); and then guiding elementary school teachers themselves—

as Kent Jones is already doing so remarkably and successfully in Chicago.

Nita Jones (Esperantist formerly in Orem, Utah, now in Gilbert, Arizona, near Phoenix) called me two nights ago. Helped by her sister-in-law who is teaching in the Patterson Elementary School there, she talked to the young principal. He is *enthusiastic* about her introducing Esperanto to *all five sixth grade classes* in the school—30-40 minutes a week each. She sent us a check, and we've sent her a pack of materials. She naturally feels scared and uncertain how to begin—so I went to my Mac and wrote a set of suggestions for her.

I visualize sixth graders in five classes greeting each other and *conversing* Esperante in the halls. I told her that her call was an answer to a prayer. I've known for years now that, with our help, "a little child shall lead them"; that is, that children around the world will lead us to *sanity: friendly communication, mutual tolerance, and love*.

NEKROLOGOJ

† EPHRON †

Oni lastatempe informis la Centran Oficejon, ke bedaŭrinde forpasis longtempa esperantisto kaj ELNA-ano Henry D. Ephron de Missoula, Montana.

† MEYER †

Ni bedaŭras sciigi pri la forpaso de Alice Meyer el Brita Kolumbio je la aĝo de 103. Multaj usonaj esperantistoj renkontis ŝin ĉe NOREK en antaŭaj jaroj. Tiu ĉarma virino estis longtempa esperantisto kiu unufoje renkontis kaj manpremis d-ron Zamenhof.

Laŭ raporto de Arlyn Kerr
Ĉiam Verde, nov.-dec. 1992

† STEINBERG †

Longtempa ELNA-ano Florence Steinberg forpasis la 14an de novembro post longa malsano. ELNA bedaŭras ŝian forpason kaj sendas kondolencojn al ŝia edzo, Sidney.

TEACHING ESPERANTO AT OUR SCHOOLS

by Ruby Bowen and Jim Murray

[Ruby Bowen is Esperanto Coordinator and Jim Murray is Principal of Scott Joplin Elementary School in Chicago, where teaching of Esperanto began on Feb. 24, 1992. The following article is taken from *Saluton*, the bulletin of the Esperanto Society of Chicago, Oct. 1992.]

The Students:

Initially, fifteen students participated in the morning classes from 7:30-8:30 a.m. This time was later changed as more students became interested. The students ranged in ages from 8 to 12 years. Many of them were targeted as low or below average achievers and were considered somewhat unmotivated in the regular classroom.

Esperanto class was held four days a week for one hour each day. One day was set aside to give the teachers exposure to the language. As many as eight teachers participated in the Teacher's class. Esperanto was offered as a part of the school's "Social Center" program.

The Response:

The students recited the Esperanto alphabets and numbers each day before instruction began. Their pronunciation improved remarkably well in a short period of time, as a result of this activity. During class, they either read stories, played mathematic games, or played other games to increase their vocabulary. Each class session ended with a song. If a new postcard arrived, a student was assigned to write a response.

The children marveled at their ability to "pick up" or learn the language so fast. Many were so excited in knowing that they could do something special. They often

demonstrated to other students and to their parents their newfound ability. As a result, more students became interested. Our students needed no encouragement to attend classes regularly, and to complete various assignments. They were usually eager and creative.

Many students wanted to join the Esperanto club. To our dismay, we had to turn them away. Since our numbers increased to thirty students, we had to add another teacher to the program. Our new teacher's enthusiasm was so great that she exposed her third grade class to the language. It would, therefore, be safe to say that we have about fifty students learning Esperanto.

Little encouragement was needed to involve teachers, parents and students about Esperanto. Several teachers attended the students' classes while others participated in the Tuesday morning sessions. We even had one member on the Local School Council participating in the classes. The parents were often supportive. They encouraged their children and some learned the language as their children learned.

Plans for 1993:

This coming year we will hopefully establish Esperanto as a permanent "fixture" at our school. The class will be offered as part of our "Extended Day" program and, again, we will be working with about thirty students, four days a week.

We plan to expose as many children as possible, involve their parents, include more teachers in our club. We have begun organizing special events and programs for this academic year. There is going to be a

beginners and an intermediate class for the students, and there is going to be a Teacher's class offered. Parents may attend these classes. We would like the whole school involved or at least knowledgeable about Esperanto.

Esperanto poses many advantages. Our students were exposed to geography, mathematics, reading, and language arts as they learned a useful, practical, and interesting language. We are very pleased to have Esperanto as part of our curriculum and encourage other schools to do the same.

[On Tuesday, the 20th of October, Dr. Gertrude Novak began teaching Esperanto to the principal (Mr. Jerome Laz) and several teachers of the Evergreen Academy at 3737 S. Paulina, Chicago, IL 60609. This series of lessons will probably continue until the holidays and then resume again in January, 1993. It is hoped that at least two of these teachers will study at San Francisco State University (SFSU) in the summer, so that they can begin teaching students in September of 1993. The beginning student group will be in grades 6 through 8.]

[This is the fourth public school in the Chicago school system that has seen a potential for Esperanto. There are also at least two others which are looking into the possibilities. Chicago-area Esperantists have also received encouragement from the Illinois State Board of Education, which is keeping an eye on the progress of all involved.]

Daŭrigo de paĝo 5

pli da homoj kaj pli agreseme informi pri Esperanto. Ĝis nun la Informa Servo de ELNA estas pli malpli *pasiva*. Tio estas, se homoj iel informiĝas pri Esperanto kaj petas informon de ELNA, ni informas ilin; se ĵurnalisto ial preparas artikolon pri Esperanto ni donas informon kaj esperas, ke la artikolo estas almenaŭ iom favora. Se ELNA estus pli granda, ni povus aĉeti listojn de homoj al kiuj ni povus sendi informon pri Esperanto; ni povus instigi ĵurnalistojn aperigi

artikolojn; eble ni mem eĉ povus aperigi reklamojn / anoncojn pri Esperanto en ĵurnaloj kaj gazetoj, ktp. Por tiel kreskigi ELNAn ni bezonus la helpon de spertulo(j) pri monpetado.


Tio estas mallonga skizo pri la jamaj atingoj de la Informa Servo dum la pasintaj kelkaj monatoj. Kio okazos en la estonteco? La Centra Oficejo baldaŭ havos telefakson kaj modemon; mi esperas, ke pro la modemo ni komputile ricevos informpetojn. La telefakso donos al informpetanto kvinan rimedon kontakti la Centran Oficejon: tiu povos

telefoni al nia oficeja telefonnumero; telefoni senpage al la 800-numero; sendi leteron aŭ poŝtkarton; komputile peti informon; aŭ telefaksi informpeton.

TEJO ankaŭ preparis novan informilon pri Esperanto. Mi sendos kopion al ĉiu Esperanto-klubo, petante, ke ili faru kopiojn kaj metu ilin en bibliotekojn, universitatojn, ktp.

Kiel ĉiam, viaj sugestoj, ideoj, plendoj, ktp, pri la Informa Servo de ELNA estas bonvenaj.

—Mike Donohoo
Direktoro, C.O.



LETEROJ

[Note: The letter column is a free-speech forum for members of ELNA. Views expressed are not necessarily those either of the editor or of the Esperanto League for North America, Inc. Comments for publication may be sent either to the address of ELNA or to Don Harlow (EUSA), P.O. Box 551, Pinole, CA 94564.]

[La jena letero de Robert Simmonds el Vaŝingtonio fakte alvenis en la printempo, sed pro diversaj problemoj en mia dokumentaro—nome, ties fatraseco—ĝi antaŭe ne aperis. Nu, tamen la demandoj traktataj restas aktualaj...]

Pri via redaktoraĵo en *esperanto usa* 91(7); Plejparte, mi certe konsentas je viaj temoj, sed pripensu ... nepre juna germano ja rekonas la radikojn de "fernsprecher", sed kial la kombinaĵo devus signifi telefono? Kial ne, egale ĝuste, laŭparolilo, radio, fortvoĉa persono, aŭ eĉ spertulo pri mensa dissendo?

Mi mem preferas E-radikdevenajn vortojn, sed ne ĝis absurdeco. Mi ĉiam elektus "suŝio"-n anstataŭ "boligita rizo, kun vinagro, envolvita per fuko, kaj enhavanta fiŝpecetojn"!

Mi estas paleontologiisto (pramortbestfakulo?), kaj mia fako abundas je problemoj. Pri "brachiopod", mia vortaro tradukas la radikojn, kaj donas "brakpiedulo". Bone! Sed, pri "cephalopod", ĝi ne tradukis, kaj donas "cefalopodo". (La traduko estus "kappiedulo". Kial "dinosauŭro", instataŭ "imponreptilio"? Eble pro tio, ke krokodilo, aŭ kvarmetra kobro, estas ankaŭ "imponreptilioj".

Konsideru la anglajn vortojn "illiterate", kaj "dyslexic". Radiklingve, ili estas preskaŭ samsignifaj. Se ni tradukus ilin, ni jam ne povus uzi ilin por distingi inter la du signifoj.

Cetere, oni emas forgesi, ke la angla ne nur (prunte)donas vortojn, sed ja estas la plej prunteprenema lingvo. Imagu, se ni fiere rifuzus uzi fremdajn vortojn, la ĉirkaŭparoladon ("circumlocution") por esprimi "curry", "machismo", "geisha", "piano(forte)", ktp!

Kion fari? Mi havas du sugestojn:

1—Se nacilingva vorto esprimas novan ideon, aŭ teknike aŭ socie, prunteprenu ĝin. Ne gravas, ĉu vorto estas vere angla (aidso) aŭ grek-latindevena (disleksio). Kompreneble, la teknikaj vortoj elvenos plejparte de la hindeŭropaj lingvoj.

2—Pri novaj vortoj sociaj, emociaj, ni devas preferi "aliajn" lingvojn. Ekzemple, el la japana mi feliĉe prenis la vortojn "wabi", "sabi", "aware", ktp. El la ĉina, "ta", aŭ el la indiana, "orenda".

D-ro Robert Simmonds

[Kompreneble, la elekto inter nete Esperantaj vortoj kaj "internaciaj" pruntvortoj estas kaj restos serio da kompromisoj—foje, kompromitoj! Sed foje la Esperantaj vortoj estas pli memklarigaj—ekz. "prabestologio" anstataŭ "paleontologio" (mi tamen ne vidas grandan ŝancon por tiu "indigena" vorto), aŭ, ni diru, "nelegipova" aŭ "nelegiva" por "illiterate", aŭ "mislegemozo" (laŭ la ŝablono de "horzonozo"—"jet lag"—kaj "postebriozo"—"hangover") por "dyslexia".]

Jen kelkaj malgrandaj korektaĵoj por la 1992(3) eldono de *esperanto usa*.

(1) *An Introduction to the Net* (p. 13) venis preskaŭ laŭvorte de ret-artikolo skribita de Mike Urban (lia "Frequently Asked Questions"). Mi aldonis nur kelkajn komentojn kaj transdonis ĝin al *esperanto usa*, do Mike meritas la krediton, ne mi.

(2) Pri la Adresaro, bv. noti, ke unu litero de mia elektronika adreso estas malĝusta; la adreso fakte estas dwwolf@RES-C4.Prime.COM (ne "RES-CA"). Tamen, pro la ŝanĝoj okazantaj en la komputila fako, eble tio baldaŭ ŝanĝiĝos, do uzu krajonon anstataŭ plumon por korekti ĝin en viaj Adresaroj.

(3) En la artikolo pri la Richardson libro (p.7), la unua alineo diras, ke ni diskutis la aferon je la 1980 LK; kompreneble tiu estis la 1986. (Eĉ ELNA ne bezonas ok jarojn por aperigi libron!)

David Wolff

[En n-ro (3) temaŝ pri simpla tajperaro—ĉu fare de la redaktoro, ĉu el la originala manuskripto, mi ne plu memoras. Tamen, David, mi mem

partoprenis mian unuan diskuton pri tiu libro je la novjara tago de 1980!!!]

Mi ĵus revenis el Orienta Eŭropo, kie—kompreneble, ĉu ne?—mi pasigis plejparton de la tempo inter samlingvanoj (t.e. Esperanto-parolantoj). En Budapeŝto, mi renkontis malnovajn konatojn kaj ekkonis novajn samideanojn. Mi pasigis agrablan vesperon ĉe *Esperajo* kaj elspezis iom da forintoj ĉe la *Libroservo* sur la jam fama por esperantistoj Kenyérmező-strato.

Sed la plejparton de la tempo mi pasigis en Transilvanio, kie mi renkontis lokajn esperantistojn (en urbo Cluj-Napoca). Ne celas mi tie ĉi prezenti raporton pri miaj spertoj tie, sed, preferinde, mi traktu nur unu el ili, kiu rilatas al renkontiĝo kun malnova (sed bedaŭrinde ne tre aktiva) kluĵa esperantistino. Eble, ĉar niaj mondoj etendiĝas ekster la limoj de Cluj-Napoca, Transilvanio kaj Rumanio, ni apenaŭ tuŝis dum nia plurhora babilado la malfacilaĵojn rumaniajn. Ni preferis diskuti pri—almenaŭ laŭnome—pli optimisma mondo: Esperantio.

Cornelia sciigis min pri la alveno de jam tri help-pakaĵoj senditaj de tute nekonata usona samideano. Ŝi neniam petis tian bonvenan helpon kaj, kompreneble, neniam rifuzis la sincerajn donacojn. Kaj, kiel decas, ŝi ĉiam perletere dankis pro la ricevitaĵoj (bedaŭrinde, sen iam ricevi eĉ vorteton de la bonkora helpanto).

Helpi tiujn en bezono ne estas nekonata afero. Sed helpi nekonaton en fora (fremda) lando, tio ja ne estas kutimaĵo, precipe kiam tio okazas pere de jam mortintaj (laŭ iuj) lingvo kaj movado. Kaj tamen la rondo familia aludita de la kreinto de Esperanto ekzistas malgraŭ malicaj asertoj venantaj de tiuj, kiuj el siaj komfortaj foteloj insistas kritiki ion, kion ili ne konas.

La ricevitaj pakaĵoj instigis Cornelia-n eĉ plie agadi en la E-a movado, kiu jen, montriĝas ne nur lingva, dum la senditaj pakaĵoj alportis al certa doktoro en Richmond, KY, novan amikon. Dankon, d-ro Jerome Krumpelman!

Ionel Onet

LANGUAGE IN THE NEWS

[Another point of view?]

Your lamentation of crumbling empires and apprehension of emerging nation states is misplaced. That is the way of nature. The one overwhelming process that keeps life going is evolution, and you can't have evolution without competition. The more competitors, the better the chance of hitting the jackpot, so Mother Nature wants more diversity: more cultures, more languages, more nations. Language differences among nations perform a very useful function as filters of information. By letting in desired information and excluding the rest, a nation can develop a very distinctive way of life, evolve in its own way. Thus, the more nations, the more ways of life, the better the chance that one of them will make an unprecedented leap of progress. Perhaps the biblical fable of Babel has more truth in it than previously supposed, although in a perverse manner.

[From a letter by Andrejs Baidins to Nature, May 14, 1992.]

[Many people in California are sick of the language problem.]

After documenting ten ... complaints of [Highland] hospital discrimination [against non-English-speaking patients], PUEBLO [People United for a Better Oakland] presented records obtained from Highland Hospital's own statistics department which revealed medical needs were unmet in 2,272 cases last year because of translation problems. ... Hospital spokesperson Jim Devitt would later argue that the 2,272 figure of unmet requests for translators in 1991 is misleading when taken out of context. ... "We met 35,000 requests for translators last year. ..."

Highland is currently employing thirteen full-time translators and has increased funding for its translation department by 44 percent in the last five years, according to Devitt. If all translators are unavailable, one of the ninety bilingual employees is called away from duty to assist a monolingual patient. Highland also maintains a registry of outside translators who can come in to assist patients who require one of the more difficult translations such as Amharic, Mien, or Punjabi, as well as American sign language.

But PUEBLO members contend that

Highland's efforts are inadequate to meet the needs of the increasingly diverse community it serves, 40 percent of whom speak a first language other than English. They argue that non- or limited-English-speaking patients wait an average of three to four hours longer for care than English-speaking patients and are often victims of racial slurs on the part of Highland employees. "When my nephew was having a seizure in the waiting room, I tried to get help, but I was told to 'shut up, you Mexican spic!'" said panelist Maria Soto.

... [Alameda County Health Services Director David] Kears and Highland administrators have begun negotiations with AT&T to install a 24-hour telephone translation service in the hospital. Patients and doctors would use the service to call bilingual operators in Monterey who could communicate between the two parties. [PUEBLO lead organizer Sandra] Davis, however, is not sure phone operators will solve the problem. "Will these operators be trained in medical terminology?" she asked. "I also think body language has a lot to do with communication, and that will definitely be lost. Then there's the question over whether the phones will put the hospital translators out of work. Our line has always been that we want open dialogue between doctors and patients, and I'm not sure the quick-fix AT&T solution will solve that."

[From a report by Meredith May, "How Do I Say Where It Hurts?" in the East Bay Express (Aug. 7, 1992); provided by the ELNA Central Office.]

[The eleventh commandment: "Thou shalt not speak anything but English!"]

Nurse's aide Jordania Reed didn't take it seriously when her nursing home imposed an English-only policy last summer.

After all, most of the aides at Driftwood Convalescent Hospital in Gilroy [CA] spoke Spanish as their native tongue, and Reed's bilingual skills had helped her land the job.

It was common sense, Reed thought, to address English-speaking patients in English. But the English-only rule also covered employees' private conversations in hallways, common areas—wherever patients might overhear.

Reed recalls thinking: "This is a stupid policy. They couldn't fire me for speaking Spanish."

Oh yes, they could. Reed got the ax Jan. 3, three days after being caught, for the second time, speaking Spanish to co-workers.

[From an article "English-only workplace rules often end up before a judge" by David Foster, originally published in the West County Times, August 30, 1992; provided by Angela Harlow.]

[Remarkable! I read almost exactly this same material about 25 years ago! "Plus ça change, plus c'est la même chose" (an English expression that has somehow penetrated into French).]

As deputy director of the Russian Language Institute [in Moscow], [Professor Yevgeny] Sheryaev has tracked, with mounting incredulity, the scores of American words that have infiltrated everyday Russian speech since then-Soviet President Mikhail S. Gorbachev introduced perestroika and glasnost to the English lexicon seven years ago.

At first, Sheryaev welcomed the invasion. After all, he reasoned, Russians lacked words for capitalist practices and for Western technology, so they might as well import terms like konsulting, leeing, verd protsesser and faks.

But his tolerance has run low recently, as journalists and politicians have increasingly turned to Americanisms as stand-ins for perfectly good Russian words.

When Russian President Boris Yeltsin meets with President Bush "as a sign of honor and respect to Bush, it's OK to call that a sammit," Sheryaev says. "But when you talk of a sammit between Yeltsin and Ukrainian President Leonid Kravchuk, that's just ridiculous. We have our own word for a meeting of top officials, but our journalists now use the American term without thinking."

From pluralizm to impeachment, partnyori to sponsori, deesk draives to modemi, the most common Americanisms are political, economic and computer-related. Most are simply plopped into the Russian language, albeit with slightly altered pronunciations. Marketing, for example, is accented here on the second syllable.

[From an article "Russians borrow

from *U.S. language*" by Stephanie Simon of the *Los Angeles, CA, Times*, reprinted in the *West County Times*, August 30, 1992; provided by Angela Harlow.]

[*Music, the international language...*]

Those little booklets that accompany CDs often provide a wealth of information about the music, the musicians, or the composer. Sometimes, however, a little something gets lost in the translation. Witness the booklet that came with a CD recording of Arthur Honegger's "Le Dit des Jeux du Monde" from Cybelia, a French record company.

We flipped past the French text and on to the English version, hoping to gain some insight into the composer's life and works. We learned that Honegger "should have written for makeshift orchestra or heterogeneous instruments, sometimes invented, which has been called odd-jobs which can play a stimulate function for musicale imagination and for artistic evolution."

We learned, too, that "An other lyric testimony of the composer particularly touching because he answers to a demonstrative wager."

The booklet calls the seventh number on the CD, "Les Hommes et la Terre," a work "as fascinating as jail door" and mentions in passing a Belgian musicologist who is "now disappeared."

But surely the most noteworthy bit of intelligence we gleaned is that "Schoenberg's name has been said several times like a scarecrow for this work!"

[From a sidebar "Speak-you English?" in *Consumer Reports*, August 1992; sent by W. C. Dickerman.]

[*All the news that fits...*]

Programmers of KSFV, a new San Fernando Valley [CA] television station, call themselves the foreign-language version of CNN, the 24-hour Cable News Network. Analysts describe KSFV as novel and timely, but also highly risky.

KSFV debuted last month on UHF Channel 24. Owned by Venture Technologies Group in Calabasas, KSFV features foreign-language news, 24 hours a day, from more than 45 countries. Some programs are broadcast live via satellite from countries such as Italy and Taiwan, while news shows from Armenia and Sweden, for example, are transmitted by tape. In all, the station boasts news programs in 40 languages.

KSFV managers say the international news format is intended to reach the growing ethnic communities in the Valley. The station can be received by residents through most of the valley, except in Burbank and Glendale.

Lawrence Rogow, KSFV's managing director and co-owner of Venture Technologies, believes a foreign language is spoken in a majority of the households in Los Angeles, including the Valley.

"By providing foreign-language news," he said, "we're providing something for which there is a demand."

[From an article "All the News, in 40 Languages" by Don Lee, originally published in *Los Angeles Times*, September 1, 1992; provided by Margaret Zarchy.]

[*Reach out and touch someone...at second hand.*]

Want to buy a dog from Germany? About to close a big-bucks international business deal? Need help in any one of 140 languages? Call the interpreters at American Telephone & Telegraph Co.'s Language Line.

The service, which provides interpreters in more than 140 languages and dialects 24 hours a day, seven days a week, features translators who speak most common languages—Spanish, French, Italian, German, Chinese and Japanese. But you can also find someone to help with more obscure tongues, such as Hausa and Tigrinia from Africa or Khamu and Mien, spoken in parts of southeast Asia.

Cedars-Sinai Medical Center in Los Angeles is one of more than a thousand hospitals that subscribe to Language Line for help communicating with non-English-speaking patients.

Language Line has become invaluable to police departments and utilities in large cities with growing populations of people who don't speak English.

New York Telephone recently realized they needed to subscribe to have translators for repair service calls.

One-quarter—3.9 million—of New York's population speaks a foreign language, said New York Telephone spokesman Kevin Sylvester.

Tony DiTommasi, spokesman for Gas Works in Philadelphia, said the 1990 census indicates the Asian and Hispanic populations there have grown by 125 and 68 percent in the last decade.

These figures prompted Gas Works to subscribe to Language Line two years

ago for their repair service. Interpreter usage went up 78 percent this calendar year, DiTommasi said.

With the availability of Personal Interpreter, an individual can place a call for \$3.50 per minute—\$4.50 per minute if calling from overseas—plus the cost of the call itself.

For subscribers, the service ranges from \$1.83 to \$2.55 per minute.

[From an article "AT&T translates on phone" by Sherri Juliana Willard of *Associated Press*, published in *West County Times*, September 18, 1992; provided by Angela Harlow.]

[*Sure. And if you believe that, I have this bridge I want to sell you...*]

A Richmond, CA, Unified School District bureaucrat reading a letter from a family in Mexico authorizing a young Mexican immigrant to attend an American high school:

"Why did they write this in Spanish? I can't read it! They should have written it in English! We'd always write such a letter in the language of the country that it's being sent to..."

[Overheard by ELNA President Angela Harlow.]

[*Crazy about language!*]

Adolfo Ruiz Alvarez, a Mexican migrant worker, never expected that when he walked down the street in Mt. Angel, OR, he would end up committed to a mental hospital for two years. But that was what happened when police picked him up and were unable to talk with him. Ruiz spoke no English, but, to everyone's surprise, he also spoke no Spanish. The natural conclusion was that he was retarded or mentally ill. It took the powers-that-be two years to discover that Ruiz spoke only Triki, an indigenous language of the Indians of the state of Oaxaca in México, and that he was not in any way mentally or emotionally deficient.

[From *Univision's Portada*, Oct. 10, 1992; reported by Angela Harlow. Editor's note: this is by no means a unique case. I remember a report of a Chinese immigrant who spent 60 years in an Illinois asylum because he was unable to speak English; when a new and more sensitive generation of doctors finally realized what his problem was, it was much to late to release him into a world for which he was no longer fitted.]



RECENZE

Ŝĉerbak, Jurij: *Cernobil*. Tradukis Elena Ŝevĉenko kaj Aleksej Ĵuravlĵov. Moskvo: Eldonejo Progreso, 1990. ISBN 5-01-002344-X398 p. Broŝurita. Ĉe ELNA: Kodo CER001, prezo \$5.00 (nemembroj) / \$4.75 (membroj)

Dum pluraj jaroj mi kutimis komenci la "turisman sezono" okaze de la—nun eksmoda—Tago de Laboristoj. En 1986, okaze de tiu senlabora festotago, kune kun geamikoj, mi vizitis belegan (kaj sovaĝan) parton de la okcidentrumania montaro. Neniam antaŭe estis mi vidinta tian helbluan ĉielon kaj ankaŭ la varmega vetero havis ion nekutiman. Ni preskaŭ ŝatis havi iom da pluvo. Kaj ĝi venis. El—denove—ne kutima kvazaŭ-plumba nuboj. En tiu, nun fora, sovaĝejo, ni nudistis ĝuante la refreŝigan pluvon. La plurtaga ekskurso finiĝis kaj ni revenis urban, portante la kutiman nostalgion, kaj tie atendis nin la granda novaĵo: okazis nuklea eksplodo ĉe iu sovetia atomcentralo, kaj ŝajne la nuboj portinta pluvon venis ĝuste de tie.

Ekzakte kvin jarojn poste, mi legis libron, kiu revenigis en mian memoron tiujn tagojn komence de majo 1986. Mi rememoras la oficialajn informojn en la rumaniaj amaskomunikiloj, la onidirojn, la ne tre optimismajn informojn disaŭdigatajn Rumanien de *Libera Eŭropo, Voĉo de Ameriko* (fakte de Usono), kaj aliaj "danĝeraj" informfontoj. Mi rememoras la longegajn vicajn ĉe apotekoj por aĉeti placeboefikajn pilolojn, kaj la zorgegon per kiu oni lavis ĉion. Sed tute mankis informoj pri la nukleaj eksperimentoj okazigitaj en tiu mondoparto en la jaroj '50, eksperimentoj, kiuj eligis eĉ pli grandan radiadon ol la ĉernobila katastrofo. Tiuj eksperimentoj havis nenion danĝeran, ĉar ili celis defendpreparon kontraŭ la "imperiisma" Usono kaj ties aliancanoj. Samtempe la usonaj lernantoj ricevis "valorajn" lecionojn pri defendo kontraŭ la minacantaj sovetiaj atomarmiloj. La samaj (usonaj) lernantoj eksciis pri ĉernobilsimilaj akcidentoj en Usono nur (plurajn) jarojn poste.

Nu, kiel ajn, ĝustatempe mi mem ricevis la "necesajn" lecionojn pri Usono, sed, ŝajne, mi ne estis diligenta lernanto. (Alie, kiel klarigi mian

plurjaran restadon tie ĉi). Sed, pli bone, ni revenu al libro de Jurij Ŝĉerbak, kies Esperanta versio aperis pasintjare ĉe la moskva eldonejo Progreso.

Kiel kutime, ankaŭ tiu ĉi libro venanta de la sama eldonejo estas teĥnike altkvalita. Sur 398 paĝoj, la aŭtoro portas nin en mondo disigita per dama katastrofo. Per bildoj, intervjuoj, priskriboj, personaj opinioj, (ege malmultaj) oficialaj deklaroj, la leganto havas la okazon ekscii iom pli pri la plej grava evento en Sovetunio, post la granda patria milito kaj (ŝajne) antaŭ la disfalo de la "ruĝa imperio".

Nepreparita leganto povus supozi, ke la libro de Ŝĉerbak estas alia oficiala, kremla raporto pri la terura okazaĵo. En realo, se ĝi ne priskribus okazintaĵon, la libro povus aspekti kiel fikcia romano, ne malpli valora ol "Stalker" de Tarkovskij aŭ "Dodeskaden" de Kurosava. Bedaŭrinde, la *dokumenta romano* baziĝas sur realaj faktoj kaj enhavas realajn rolulojn. Malfeliĉe! Mi mem ŝatus, ke tiu libro estu fikcia. Sed, ĉu ni kapablus lerni el tia fikciaĵo?!

Samkiel ĉe Ĉernobil kaj en Sovetunio ĝenerale, ne mankas eraroj, ankaŭ en tiu ĉi libro kelkaj eraroj trovis lokon. Ili estas, sendube, malgrandaj, kompare kun la valoro de la libro, kiu por iuj montros la malkvalitojn de sovetianoj (ofte nomataj rusoj) kaj por aliaj estigos demand-signojn. Nur leginte la libron demandu vin, al kiu kategorio vi apartenas. *Cuisvis hominis est errare, hullius nisi insipientis in errare perseverare...*

Ionel Onet

Sade: *Florville kaj Courval aŭ fataleco*. Tradukis Armela LeQuint kaj Ĵak LePuil. Chapecó: Ledon, 1992. 80p. Broŝurita. Ĉe ELNA: Kodo FLO001, prezo \$8.00 (nemembroj) / \$7.60 (membroj)

Preskaŭ samtempe trafis min du libroj, kiuj, krom la aŭtoron, havas alian komunan trajton: ili estas la unuaj tradukaĵoj el tiu aŭtoro en la koncernajn lingvojn. Temas pri *Florville kaj Courval aŭ fataleco* kaj *Justine*, ambaŭ de Donatien-Alphonse Francois, markizo

de Sade (1740-1814). La unua estas en Esperanto, la dua en la rumana.

Por starigi la harojn de certaj personoj sufiĉas nur mencii la nomon Sade, sekve mi okupiĝu pri nur unu el la du libroj, provante, eventuale, konservi kelkajn amikojn.

La unua en Esperanto libro de Sade estas rezulto de internacia kunlaboro (franca-brazila) kaj aspektas samkiel aliaj eldonaĵoj venantaj de la fama brazila "Fonto", kvankam la menciita eldonejo estas nur la kompostinto. La verkon aperigis Gilbert R. Ledon kaj ĝin tradukis el la franca Armela LeQuint kaj la kancerklinikisto Ĵak LePuil.

Sur malpli ol 80 paĝoj la leganto venas en kontakto kun monstrino. Nu, oni trovu pli taŭgan nomon por virino, kiu, dum periodo riĉa je tabuoj kaj malpermesoj, sukcesas du murdojn kaj tri incestojn. Sed, ĉu kulpas la rolulino mem, kiu cetere estas virta, afabla kaj sentema, pli ol la aliaj roluloj, aŭ pli ol la socio en kiu ŝi vivas?

Kiel sciante, la malpermesata frukto estas la plej dolĉa, kaj vane la Dioj (legu "politikistoj") gardas la kon-fruktojn. Adamo (legu "la homo") havigos al si ĉiam part(et)on de tio, kio al li decas. La rolulino de Sade eraras pro manko: manko de scio, manko de konoj. Pro tiuj mankoj, ŝi estas kulpigebla. Sed ne nur ŝi: tiuj, kiuj ne faciligis al ŝi kaj aliaj kiel ŝi la vojon al la necesaj konoj estas same, eĉ pli, kulpigeblaj. Kaj saltante antaŭen du jarcentojn (t.e. en niajn tagojn), ni demandu kiu kulpas pro la nuntempaj Florvilloj kaj Justinoj kaj aliaj "gemonstroj" el la verko de Sade? Ĉu ili / ni ne estas viktimoj de certaj endoktrinigoj (filozofiaj, religiaj, politikaj kaj alispecaj)?

Legante *Florville kaj Courval* (en kiu, cetere, preskaŭ mankas eraroj) mi emas nun (eble pli ol antaŭe) (re)legi la artikolojn pri Sade en la grandaj enciklopedioj, por vidi kiel socio riĉa je antaŭjuĝoj estas informata pri unu inter la plej valoraj francaj verkistoj de antaŭ du jarcentoj, ankoraŭ konsiderata kiel simbolo de l' malbono, kaj kiu, tamen, tra la tuta prezentata libro uzas eĉ ne unu fian vorton. Sekve, se vi volas pligrandigi vian vortaron de fiaj vortoj, ne esperu fari tion per la verko de Sade. Provu ĉe Peter Peneter.

Sed, ĉiukaze, al tiuj, kiuj volas pligrandigi sian kulturon mi sugestus legi la unuan (kaj espereble ne la lastan) tradukaĵon de Sade.

Ionel Onet



VOLAS KORESPONDI

Noto: Nomojn kaj adresojn ni prezentas dikliteraj; familiaj kaj urbaj nomoj estas MAJUSKLAJ. Komojn ni uzas por montri ŝanĝon inter linioj en adreso.

ALBANIO

Gledis FORTUZI, Rr. Ali Baushi, P. 7. SH. 2. Ap. 12, TIRANE. Kun knabo aŭ knabino 16-20-jara, eble futbalamanto (usona futbalo).

ARMENIO

HUSJAN Hraĉja, 375012 EREVAN, strato Vagram Papaz, jan. 17/49. 37-jara elektrikisto, ne edziĝinta, interesiĝas pri muziko, psiĥologio, kaj orientaj sportartoj.

BRAZILIO

Waldeci Lau da SILVA, Rua Rosa de Gusmão, 102—Guanabara, 13.073-120 CAMPINAS—SP. 37-jara viro, interesiĝas pri ĝenerala kulturo, politiko, ekonomio, arto, turismo, ktp, speciale pri natura nutrado.

ĈEĤOSLOVAKIO

Milan KRÁKORA, 332 02 STARY PLZENEC ĉ. 543. 33-jara laboristo en vilaĝo apud Plzen (Pilsen), kolektas fotojn kun subskriboj de geaktoroj, gekantistoj kaj grupoj.

FRANCIO

Paul LEDUC, 31 Str. Chambre aux Dniers, 49000 ANGERS. Viro, interesiĝas pri vivmaniero en Usono, kolektas poŝtmarkojn kaj telefonkartojn.

Amikeco trans limoj

POLLANDO

Barbara KLUSKA, ul. Wygon 24b, 34-460 SZCZAWNICA. 32-jara komercistino kaj samaĝa edzo, havas du infanojn, kun samaĝuloj, interesiĝas pri vivo, turismo, komputeroj, kolektas sondiskojn, videofilmojn, ŝatas vojaĝi, volonte interŝanĝos vizitojn.

RUSIO

Katja KOKAREVA, ul. Legorova 4-3, 183033 MURMANSK. 16-jara lernantino, ŝatas modernan kaj klasikan muzikon, violonas, studas la anglan, ŝatas legi kaj volonte sportas (karateo).

Sergej Jurieviĉ PAĤOMOV, ul. Lermontova 14-76, 613020 KIROVO-ĈERECK, Kirov obl. 29-jara elektisto, ŝatas legi, aŭskulti muzikon, vojaĝi, volas lerni pri Usono.

Elena MASIUKAITE, Olga BARDINA, Natalija GOLUBEVA, Nina NIKULINA, MORENKO Irina kaj Valerij, ĉiuj ĉe Murmanksa Esperanto-Klubo, a.ja 4714, 183050 MURMANSK. Kuracistoj, anoj de la Murmanska klubo, volas unuope korespondi.

TOGOLANDO

ATAYIAyikoe, B.P. 60976, LOMÉ. 28-jara komercisto, literaturisto kaj komputera operaciisto, ŝatas sporton, interŝanĝon, vojaĝadon.

UKRAINIO

Tatjana GILJAKA, 245110 SHOSTKA-PYC, p.k. 49, Sumska obl. 26-jara virino, kolektas markojn, pupojn en naciaj kostumoj, bildkartojn, librojn, interesiĝas pri literaturo kaj modo.

PERSONE

DALLA POZZA

ELNAano Bruno Dalla Pozza gajnis oran medalionon pri ĵudo ĉe la Aŭstraliaj Majstraj Ludoj en Brisbane la 23an de oktobro, 1991. Samideano Dalla Pozza instruas ĵudon kaj muzikon ĉe la Kolegio de Nordaj Marianaj Insuloj.

KERR

Esperantistino Julie Kerr gajnis la duan premion en la Alice Schaeffer Matematika Premiario. La usonaj virinoj en matematiko donas tiun premion ĉiujare al la plej bonaj universitataj studentinoj en la lando. Oni citis ŝiajn sendependan laboron, talenton, kaj sukceson en naciaj universitataj konkursoj. Dum la somero Julie partoprenis en sep-semajna matematika esplora programo en Indianio, kaj ŝi esperas, ke matematika revuo publikigos ŝiajn novajn rezultojn. Post la programo, ŝi ĉeestis la Internacian Junularan Kongreson en Montrealo.

Raportis Arlyn Kerr
Ĉiam Verde, nov.-dec. 1992

ONET

Ionel Onet, Vic-Direktoro de la ELNA Centra Oficejo, kies originalaj kaj tradukitaj poemoj jam aperis i.a. en *Fonto* kaj *La Kancer-Kliniko*, nun debutis anglalingve en usona poezia konkurso. La originala poemo "Declaration" ricevis Merit-Premion de World of Poetry, kaj aperos en la nova libro *Our World's Favorite Poems*.

Daŭrigata de paĝo 1

servintaj ĝis nun." (p. 8) La plejparto el homoj kapablaj legi ĉi tiun recenzon kapablu iel alimaniere redoni la du propoziciojn.

Frue en la rakonto (p. 2) ni informiĝas, ke la junulo "diris per neperfekta angla lingvo, 'Mi petas pardonon'. Mi ne povas senti la neperfektan anglaĵon. Ĉu eble, "I beg pardon"? Jen tasko por sufiĉe kompetentaj esperantistoj: utiligi la proprajn observojn en Esperantujo kaj krei kredoblan dialektaĵon.

La eldonisto sciigas al mi detalojn de la

verko. Li trovis la originalan eldonon en la arĥivejo de ELNA. Ĝi aperis ĉe Esperanto Library, Middleton, WI, en formato tajpita kaj mimeografita. Kio estas korektita en ĉi dua eldono? Nur evidentaj tajperaroj kaj longegaj frazoj, kie li enmetis komojn por klarigi la sencon.

Kiu estas(is) la aŭtoro? Laŭ eldonista esploro tiu homo estis membro de UEA ĝis iam inter 1947 kaj 1962. La lasta konata adreso estis en Tampa, FL (1986). Lastatempa letero sendita tien revenis kun indiko de nekonateco. Laŭ trovita foto, s-ro Wagner estis jam tre aĝa antaŭ jardekoj.

La modesta celo de la verko estas, laŭ

aŭtoro antaŭparolo, iugrade forigi la mankon de originala Esperanta literaturo. Li anticipis, ke ankoraŭ restos sufiĉe longa tempo antaŭ ol la nombro kaj kvalito de originalaĵoj egalos la "bonegajn tradukaĵojn" jam ekzistantajn.

Ĉi tria produktaĵo de Eldonejo Bero aperas okaze de la 40a datreveno de ELNA. Ĝi estas ĝuebla legaĵo por postbazuloj kaj plikapabluloj. Kaj la stilo mem estus taŭge analizenda en kurso je nivelo postbaza aŭ pli alta. Unu demando al eventuala kursano estus: Kial *La seĝo dektri* kaj ne *La dektria seĝo* aŭ *La seĝo dektri*?

Reginald Jaderstrom

VOJAGU ESPERANTE EN 1993



Esperanto Classes

San Francisco State University
28 June-16 July
3-week multilevel courses
"The best in the world"
Prof. David K. Jordan
Mark Fettes from Canada
Boris Kolker from Russia

Esperanto Workshop

University of Hartford, Conn.
12-16 July 1993
1-week multilevel courses
Dr. Humphrey Tonkin, Director
Study intensively and stay on for the...

ELNA Convention

July 17-20
Univ. of Hartford, Connecticut

Post-convention excursion in the area or go on to the...

Pre-U.K. Tour to Barcelona, Spain July 21-24, 1993

Depart U.S. July 21, arrive Barcelona July 22. Barcelona is an exhilarating city, steeped in history. It is not only the political capital of the north, where one can best evaluate the problem of regional separatism in Spain, but also it is the intellectual capital of the country, with a fascinating collection of museums. And the *Ramblas* is one of the most delightful walking streets in the world! We will spend two nights here and then transfer directly from our hotel in Barcelona to our hotel in Valencia for the 78th U.K.

Universala Kongreso de Esperanto July 24-31—Valencia, Spain

The Mediterranean region south of Barcelona is famous for its magnificent scenery, beautiful long beaches and endless orange groves. There won't be a whole lot of time to spend at the beaches because the convention program will be so rich and varied; but you haven't tasted a good orange until you've eaten one in Valencia. Being raised in an orange grove in Southern California in no way prepared me for that marvelous experience! We understand that the banquet will be reasonably priced (for a change) this year and will center around the largest Paella pan in the world. You'll have to see it to believe it!

Our Hotel—the Valencia Mella

The only hotel really close to the kongresejo, the Music Hall. Four-star, air-conditioned rooms with a very nice buffet breakfast, and only a block and a half from the kongresejo. It will be easy to walk back to rest during the planned siesta time during the heat of the day, between 1 and 4 PM.

Post-U.K. Tour of Spain and Portugal August 1-10 1993

Departing our hotel, we travel from Valencia for lunch at Cuenca, famous for its "hanging houses" and medieval atmosphere; and then on to Toledo, the "soul" of Spain for a night and a full day tour. After two nights and an artistic tour of Madrid, we go on to Segovia, Avila and Salamanca. The following day we proceed through Leon and on to Santiago de Compostela for two nights. We then cross down to Porto in Porgual for a night, and on to Lisbon and its surroundings for two nights. A glorious delightful tour with the option of staying longer in Lisbon. We'll be visiting with Esperantists along the way, of course.

49a Internacia Junulara Kongreso August 7-14, 1993—Vraca, Bulgaria

Hopefully there will be increased interest in this Esperantist youth conference among the growing number of young Esperantists here. We plan to have Ionel Onet lead the group.

"Lusi" Harmon
Esperanto Vojag-Servo
6104 La Salle Avenue
Oakland CA 94611
[510] 339-2001

**USE YOUR ESPERANTO TRAVEL
SERVICE FOR ALL YOUR
ESPERANTO TRAVELS!**



President: Angela Harlow (1993), P.O. Box 551, Pinole, CA 94564, tel. (510) 222-0187
Vice President: Dr. Grant Goodall (1993)
Secretary: Ellen Eddy (1995)
Treasurer: John B. Massey (1994)
Other Board Members: Dr. E. James Lieberman (1993), Sherry Wells (1993), David Wolff (1993), William R. Harmon (1994), William H. Schulze (1994), Mark C. Stephens (1994), Thomas Eccardt (1995), D. Gary Grady (1995), Rochelle Grossman (1995)

Commissioners and Chairs: Don Coleman (Local Clubs, Nominating), John Dale (Legislative Affairs), Jim Deer (Tape Service), David Gaines (Youth), Lucy Harmon (Travel Affairs, Instruction), Dorothy Holland-Kaup (Correspondence Courses), R. Kent Jones (Science & Technology), Dr. Julius Manson (United Nations), John B. Massey (Wills and Gifting), John B. Massey, William H. Schulze and Sidney V. Steinberg (Kapitala Fondusa Komitato), John Mathews (Service Clubs), Catherine Schulze (Postal Course), Sherry Wells (Publicity), David Wolff (Publishing)

Director, Central Office: Mike Donohoo
Vice-Director, Central Office: Ionel Onet

ELNA Archivist: Ionel Onet

Any member wishing to assist in the work of any of the above named commissions or committees should communicate with the member(s) shown.

ELNA Dues for 1993

Regular	\$30
Family	\$45
Youth (under 27)	\$15
Limited income	\$15
Sustaining	\$60
Life	\$600

ELNA is a non-profit organization functioning under IRS paragraph 501(c)3. Donations are tax-deductible.

A separate supporting category, "Friend of Esperanto," has been established. A Friend of Esperanto pays \$10 per year.

Libraries and other institutions can subscribe to *Esperanto U.S.A.* at the special rate of \$15 per year.

UEA dues 1993

Member-Guidebook only (MG)	\$ 9.00
Member-Yearbook only (MJ)	\$22.00
Member-Subscriber (MA)	\$54.00
Societo Zamenhof (additional)	\$108.00
Subscription only to <i>Esperanto</i>	\$32.00
Subscription only to <i>Kontakto</i>	\$18.00
Life Membership in UEA	*\$1125.00

Send payments for UEA memberships or subscriptions to ELNA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Make all checks payable to ELNA.

MOVING? DON'T LEAVE ESPERANTO BEHIND! If you have moved recently or are planning to move in the near future, don't forget to send a change-of-address card to the ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito CA 94530. This will assure your continued receipt of the Newsletter and other information. If you don't have a stamp handy, give the CO a call at (510) 653-0998. Thanks!

**DEADLINE FOR MATERIAL FOR
ISSUE 1993(1) of Esperanto U.S.A. is Jan. 25,
1993**

Esperanto U.S.A.
Volume 28, No. 6
ISSN 1056-0297
Esperanto League for North America, Inc.
P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530
Telephone: (510) 653-0998
For info: (800) 828-5944
Editor: Don Harlow
Telephone: (510) 222-0187